

STARTO

N-ro 4/2025 (297)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Foto Milan Kolka

Asocia kongreso en Havířov-Těrlicko
Jaškovská krčma

17 – 19 oktobro 2025

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
aperas 4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz
redakce@esperanto.cz

Identec-numero (IĈ): 00 44 30 34

Starto retroŝte: starto@esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: Cink: 1160 Kč, 700 Kč (rete), 400 Kč (rete por ĈEA-anoj); Marĉek: 1360 Kč, 900 Kč (rete), 600 Kč (rete por ĈEA-anoj), Cink por progresintoj 1920 Kč, 1000 Kč (rete), 700 Kč rete por ĈEA-anoj). Aliĝoj: kurzy@esperanto.cz

Libroservo: Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

Sekcioj de ĈEA: blindula, katolika, kristana, grupo por ciferecigado (memstariĝis: handikapitoj kaj fervojistoj)

Komisionoj de ĈEA: pedagogia

Muzeo: muzeagrupo@esperanto.cz

Reteja grupo: redakce@esperanto.cz

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:
sufiĉas sendi kopion, skanaĵon, ligan al la gazeta retejo, skribu al:
muzeo@esperanto.cz

BANKO-KONTO de ĈEA:

2800 186 228/2010

Fio banka Svitavy

Výbor ĈES:

Předseda: Mgr. Ing. Jiří Tomeček, tel. 602 611 584, tomecek@esperanto.cz; (koordinace a reprezentace ĈES, muzeum Svitavy)

Místopředseda: Mgr. Libuše Hýblová, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz (vnější vztahy, UEA, EEU)

Pokladník: Mgr. Andrea Švubová, DiS, svubova@esperanto.cz (evidence a aktualizace členské základny, účetnictví svazu a správa majetku ĈES)

Člen výboru: Leonarda Chaloupková, leonarda.ch@seznam.cz (kluby a sekce, konference, granty)

Člen výboru: Mgr. Josef Kalčík, kalcik@esperanto.cz (spolupráce s mládeží, web)

Redaktor Starta: Miroslav Malovec, miroslav.malovec@esperanto.cz (jazyk a historie hnutí, kultura, odborné aplikace, pedagogika)

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio:

Petr Chrdle, Anglická 878,
252 29 Dobřichovice, tel. 736 645 455,
chrdle@kava-pech.cz

UEA-kotizperanto: Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La pagojn sendu al la konto de ĈEA (vidu paĝon "Jak platit svazu"). Admi-
stras: Petr Chrdle.

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorfer-domo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, muzeo@esperanto.cz
www.muzeum.esperanto.cz

Facebook kaj Ipernity

www.facebook.com/Esperanto.cz/

www.ipernity.com/home/esperanto-muzeo-svitavy

www.facebook.com/groups/esperanto.muzeo.svitavy/

www.facebook.com/muzeumesperantasvitavy/

Kontrollegis: la komitato, K. Votoček, V. Türk, P. Dvořáková

KONGRESO DE ĈEA EN HAVÍŘOV-TĚRLICKO

Dum la tagoj de la 17-a ĝis 19-a de oktobro 2025 okazis en pitoreska, malnov-moderna gastejo *Jaškovská krčma* en Těrlicko la 19-a Kongreso de ĈEA.

La komitatanoj venis jam unu tagon antaŭe por prepari ĉion necesan por glata paso de la Kongreso – la plej streĉiga tasko estis dislokigo de la partoprenantoj en ĉambrojn. La gastejo, *Jaškovská krčma*, kiu estas la plej malnova en nia lando (ĝi devenas el la jaro 1268) gastigis ankaŭ alian grupon por „ora nupto“, tial ĝi proponis al niaj organizantoj precize tiom da lokoj, kiom da homoj venis – 50. Malgraŭ tio necesis respekti ĉambrojn por viroj, por virinoj kaj por geedzaj paroj, kio estis preskaŭ rebuso.



Pli amuza kaj leĝera estis preparado de la kongresaj sakoj kun propagandaj materialoj.

Bela estis ĉirkaŭaĵo de la gastejo, ĉar ĝi kuŝas sur la bordo de la digolago Těrlicko, nur kelkajn metrojn de la akvo.

Vendrede posttagmeze, la 17-an de oktobro, jam venadis unuaj ĉeestantoj. Kvankam la alveno al la gastejo de stacidomo Havířov, kien celis plejparto de la partoprenantoj, estis iom komplika (de la stacidomo oni devis veturi per aŭtobuso al aŭtobusa stacidomo, de tie per alia aŭtobuso

al stacio en Těrlicko kaj de tie piede atingi la gastejon), neniu perdiĝis.

Post akcepto de la partoprenantoj kaj ilia loĝigo sekvis komuna vespermanĝo en granda salono en la unua etaĝo. Tie poste okazis vespera programo kaj fakte ĉiu sekvanta paŝo de la kongreso.



Vesperan programon malfermis Petro Chrdle per prelego pri Vuk Echtner (1905-1994), esperantisto kaj bahaisto, kiu estis instruisto de nevidantaj esperantistoj kaj redaktoro de brajle presita informilo *Aŭroro*. Pro bahaismo li estis persekutata kaj travivis kelkajn jarojn en malliberejo.

Sekvis amuza parolado pri ĉi-jara 110-a UKo en Brno. Siajn impresojn transdonis anoj de preparkomitato kaj helpantoj.

La vespero finiĝis per kantado ĉe gitaro de eminentaj Josef Kalčík kaj Vlád'a Türk.

Sabate antaŭtagmeze okazis kunsido de ĈEA-anaro. Komence salutis la Kongreson vicurbestro de Havířov – la unuaj liaj vortoj estis en Esperanto! Salutparolis ankaŭ prezidanto de la E-klubo en Havířov Zdeněk Heiser kaj pola esperantisto Aleksander Zdechlik. Krom kvar poloj gatis ankaŭ Magdalena Feifičová el Slovakio.

Poste sekvis jam traktado de la Kongreso: raporton pri agado de ĈEA dum lastaj 3 jaroj prezentis prezidanto de ĈEA Jiří Tomeček, pri mastrumado raportis kasistino de ĈEA Andrea Švubová, pri E-kluboj Leonarda Chaloupková. Kiel la plej grandan sukceson de la agado de ĈEA taksas la prezidanto la sukcesan organizon de 110-a UKo en Brno 2025.



Koncerne la mastrumadon aperis propono pri altigo de anaraj kotizoj. La kotizoj estis en la sama alteco kelkajn jarojn, dum elspezoj por kelkaj aferoj kreskis. Kaze ke la komitato lasus la saman kotizon plu, financaj eblecoj de la asocio efektive daŭre malkreskus. Komitato strebas lasi la membrecon alirebla al plej vasta ĉeĥa publiko, do la plialtiĝo estos nur 50 Kč, sed anoj povas subteni la agadon de la asocio plu per donacoj. Rigardu, kiel la komitato uzis donacojn: <https://www.esperanto.cz/cs/aktuality/k-cemu-vyuzijeme-vas-financni-dar.html>

Oni nomumis kvar novajn honorajn membrojn de ĈEA – gesinjorojn Oldřich A. Fischer, Max Kašparů, Vlasta Piščíková kaj Jan Řepa. Ĉiuj meritas la aprezon pro sia laboro en ĉeĥa Esperantujo!

Radmila Švejcárová, prezidantino de balota komisiono, prezentis novajn anojn de komitato de ĈEA. La anaro konsentis kun propono de Radmila, ke la baloto de la komitatoj estu komuna por ĉiuj adeptoj, kaj publika. – Jiří Tomeček, proponita por posteno de prezidanto de ĈEA, informis pri 3 ĉefaj taskoj por nova komitato por venontaj 3 jaroj: pli efike komuniki kun ĉeĥa neesperantista publiko, pli bone informi ĉeĥajn esperantistojn pri agado de komitato de ĈEA, revizii Statuton de ĈEA (ĝisnuna Statuto validas de la jaro 2012).

Post nelonga paŭzo la prezidantino de la balota komisiono alvokis la ĉeestantojn por baloti pri novaj anoj de la komitato. Oni reelektis la ĝisnunajn membrojn – gesam-ideanojn Jiří Tomeček, Libuše Hýblová, Josef Kalčík, Andrea Švubová, Miroslav Malovec, Leonarda Chaloupková.

Kompreneble, helpantoj al la komitato estas bonvenaj.

Sekvis raporto de Petr Chrdle, ĉefdelegito de ĈEA por UEA.

Dum ĉarma aŭtuna posttagmezo la kongresanoj promenis laŭlonge de la digolago Těrlicko. La promeno finiĝis en agrabla kafejo, de kie oni revenis al la gastejo-konferencejo. Nur tri kuraĝuloj ĉirkaŭiris la digolagon, kio signifas kelkajn kilometrojn.

De la 17-a horo oni daŭrigis la programon en la granda salono: “Ekparolu” de Milan Kolka, prezento de libro Ĉapitroj de Romaa historio de Oldřich A. Fischer, “Reta babilado” de Josef Kalčík kaj amuza filmeto de E-mentala aranĝo 2025 – “Ĝuu EsperantoN”. Marek Pavlovský prezentis esperantlingvajn retradiojn.

Ne mankis libroservo prizorgata de Marie Čumová. Ĝi estis lokita en ĉambro kontraŭa al la salonego kaj proponis krom libroj ankaŭ bieron kun UK-emblemo (alkoholan kaj senalkoholan). Libroj estis kaj novaj kaj malnovaj en librobrokanta skatolo, sufiĉe riĉa repertuaro.

Sabatan programon kronis solena vespero kun bela muziko, dancado, riĉa tombolo kaj entute ĝoja, amikeca atmosfero.

Výtah ze stanov ČES

Cílem tohoto dokumentu je vyjasnit si, které činnosti k říjnu 2025 pokrýváme a které nikoliv.

- Červená** - není vykonáváno
- Oranžová** - vykonáváme, ale jsou tam nejasnosti (např. Není jasné kdo, co, jak dělá)
- Zelená** - vykonáváme, je určen zodpovědný člověk

Čl. II
Poslání Svazu
Posláním Svazu je přispívat k podpoře jazykových práv a spravedlivému řešení problémů v mezinárodní jazykové komunikaci, k uchování kulturní plurality a podpoře přátelství, tolerance a porozumění mezi lidmi v souladu s ustanovením čl. 2 a 7 Všeobecné deklarace lidských práv přijaté 10. 12. 1948 Organizací spojených národů a za tímto účelem šířit a všestranně používat mezinárodní neutrální jazyk esperanto.

Čl. III
Cíle Svazu
Cílem Svazu je zejména:

- a) **šitit** esperanto mezi českou veřejností a **zpřístupňovat** bohatství tohoto jazyka a jeho kultury českým uživatelům,
- b) **proměňovat esperanta šitit českou kulturu v zabraně** a (je vykonáváno, od Petišky Golem, příběhy izraelské a mezopotámské)
- c) zajišťovat činnosti vyplývající ze stanov Svazu.

Čl. IV
Činnost Svazu
1. Při plnění svého poslání a svých cílů Svaz rozvíjí následující hlavní činnosti:

- a) **struzit** zájemce o mezinárodní jazyk esperanto a usiluje o rozšiřování své členské základny, Andrea - čl. Základna, Mirek informuje Starto, Josef - informuje elektronicky, výbor pořádá roční konferenci
- b) podporuje tvorbu **šloviků** (Mirek - probrat do budoucna), **učebnic**, **internetových stránek** a dalších **šitit** (PAKEO, Legajoj - Jindřiška) a **připravuje tak esperanto k jeho úloze mezinárodního komunikačního prostředku**

poste aperis trafa traduko de Ertl. Komprenble eblas ankaŭ aliaj solvoj, kaj alia tradukanto certe uzus diferencon esprimon, same sukan. Ĉu vi sciuz, kiel traduki la ĉeĥan **úžasná blondýna** aŭ aliajn similajn esprimojn? Eminentaj, sprita programero.



Antaŭ tagmezo, preskaŭ precize, kiel estis planite, la prezidanto de ĈEA tralegis rezolucion de la kongreso en Havířov-Těrlicko.

Finiĝis la sukcesa kongreso, kiu plenumis ĉiun eron de sia planita programo.

Koran dankon al anoj de E klubo Havířov, kiuj sindone kunlabore kun la komitato de ĈEA aranĝis la kongreson!

*Leonarda Chaloupková
kaj Miroslav Malovec*

Dimanĉe antaŭtagmeze estis daŭrigita la oficiala programo. Kun diskutgvidado de Josef Kalčík partoprenantoj pridiskutis aktualan Statuton kaj okazis diskuto pri prioritatoj - kio en aktuala Statuto estas la plej valora kaj farinda afero. Tiu diskuto ne finiĝis en Těrlicko, sed daŭros kun vi ĉiuj kaj rezultos espereble en nova, aktualigita Statuto.

Vladimír Türk prelegis pri historio de ĉeĥa trampado. Oni aŭdis lian rakontadon, kantadon kaj gitarludon kaj sekvis tiutempajn nigreblankajn filmetojn. Tre interesa prezentaĵo!

La programo finiĝis per amuza "Komparo de tradukoj". Mirka Tomečková, pere de lumbildo kaj trafa situacio prezentis la ĉeĥan kaj esperantlingvan tradukojn de libro *La edzino de l' tempvojaĝanto* de usona verkistino Audrey Niffenegger (esperantigis hungaro István Ertl). Mirka diris ekspresivan vorton aŭ frazeton ĉeĥe, la ĉeestantoj klopodis diveni Esperanto-tradukon kaj nur



Usnesení 19. sjezdu Českého esperantského svazu, z. s. (ČES), který se konal v Havířově od 17. do 19. října 2025

Sjezd zvolil:

členy Výboru ČES pro volební období 2025 - 2028 ve složení: Jiří Tomeček (předseda a statutární orgán), Libuše Hýblová, Leonarda Chaloupková, Andrea Švubová, Miroslav Malovec a Josef Kalčík.

Sjezd schválil:

1. zprávu o činnosti ČES přednesenou předsedou J. Tomečkem;
2. zprávu o hospodaření a členské základně ČES přednesenou pokladníkem A. Švubovou;
3. zprávu o činnosti klubů přednesenou L. Chaloupkovou;
4. udělení čestného členství následujícím členům ČES:
O. A. Fischer, J. M. Kašparů, J. Řepa a V. Piščíková.

Sjezd bere na vědomí:

1. zprávu delegáta UEA P. Chrdleho;
2. pořádání konference v Poděbradech ve dnech 25. - 27. 09. 2026 s možností prodloužení do pondělí 28. 09. 2026.

Sjezd vyzývá:

- 1: členy k větší aktivitě a informování výboru ČES o svých akcích pro využití do Starta, na web esperanto.cz, sociálních sítích, případně na Wikipedii;
2. všechny členy ČES propagovat Muzeum esperanta ve Svitavách a podporovat jeho činnost;
3. členy zvyšovat svou jazykovou úroveň a snažit se o složení jazykových zkoušek.

Sjezd ukládá výboru:

1. prověřit dlouhodobě neaktivní členy a aktualizovat členskou databázi;
2. pokračovat v jednání o společné akci s GEA v roce 2026;
3. zjistit podmínky pro pořádání hybridních (fyzická a online) setkání;
4. připravit návrh úprav stanov ČES;
5. připravit a zveřejnit nový Příspěvkový řád s platností od 1. ledna 2026.

v Havířově 19. října 2025

Diskuse o Stanovách

Milan: elektronická verze slovníku – cvičebnici k Marčekově učebnici – jazykové procvičování na konferenci – propagace KER zkoušek – výuka dětí

Leonka, Marek, Mirek: vytvořit propagační materiál/leták – po ukončení kurzu sledovat/podporovat účastníky

Radmila: věční začátečníci: víkendový seminář dobrý, ale jazyk je potřeba učit se častěji, ideálně každý den – místní akce zviditelnit pomocí místního tisku

Milada Z: víkendový seminář jako Skokovy by byl užitečný pro jazykovou praxi – Milada zviditelňuje EO v TV a místních novinách – vývěska: propagace místního klubu, podpora spolupráce s dalšími

Petr Ch.: eksterlanda reklamo de ĈR estas farita – ne necesas fari lingvajn ekzamenojn per ĈEA, KER ekzamenoj servas same – paroligaj grupoj: retaj granda helpo, personaj kunvenoj gravas

Mirka: aktualizovat zastaralé texty v učebnicích, vytvořit webové stránky přitažlivé pro širokou veřejnost, mezinárodní setkání bez jednání svazu

Monika: chybějí propagační materiály pro mladší a starší generaci – cestování pro mladé – PAKEO

Novaj honoraj membroj de ĈEA



Oldřich Arnošt Fischer (1955) naskiĝis en Třebíč, nun vivas en Brno. Post studado de veterinara medicino li laboris kiel esploristo. En la kluba retejo de KE Brno estas elŝuteblaj 85 liaj prelegoj pri la naturo, gravaj personoj, ekumenaj kongresoj de Esperanto, pluraj eĉ registritaj kiel videoj. Li enĉeĥigis librojn *Arne, syn náčelníka* kaj *Atributy apoŝtolů a evangelistů*, esperantigis *Čerkoturneo*, *Pensoj pri la esenco* kaj *Ĉapitroj el la romaa historio*. Proprakoste li eldonis proprajn broŝurojn pri la naturo *Kun fotilo inter libeloj*, *Skaraboj*, *papilioj kaj aliaj insektoj antaŭ objektivo*, *Ie sub niaj piedoj*, *Ekkompreni neparolantojn*, *El la mirinda mondo de dipteroj*, *Arboj kaj arbedoj*, *Orĥideoj vivantaj kaj sur poŝtmarkoj*. Ĉiujn akompanas liaj koloraj fotoj.

Jaroslav Maxmilián Kašparů (1950) estas premonstrata diakono, stomatologo, psikiatro, pedagogo,



publike konata aŭtoro de spirita literaturo, ofte aperanta en televido kaj radio. En la libro de rekordoj li estas enskribita kiel homo kun plej multaj universitataj titoloj. En Esperanto aperis liaj verketoj *Kristnaskaj demandoj kaj paradoksoj* (tr. Marek Blahuš), *Psikiatria vortareto ĉeĥa-esperanta* kaj *Dek paŝoj al ĝojo*. En la ĉeĥa trideko da libroj, ni menciuj kelkajn titolojn *Blázinec před branou* (Frenezulejo antaŭ la pordego), *Člověk má věřit celým tělem* (Homo kredu per la

tuta korpo), *Jak přežít krizi v rodině* (Kiel transvivi krizon en familio), *Deset kroků k radosti* (Dek paŝoj al ĝojo) k.s.

Vlasta Piščíková (1964) en la jaro 1998



fondis kun kelkaj amikoj satiran kaj parodian klubon **E-mental'** (esperantistoj mense handikapitaj) kiel Kleran Despotismujon kaj fariĝis ĝia diktatorino. Dum 25 jaroj la klubo realigis multajn aranĝojn kaj vojaĝojn, en kiuj ĝi propagandis Esperanton, partoprenis eĉ karitatajn aranĝojn (Helpu helpi, Briko, Kuro por „Paraple“). Ili kreis subtekstojn por filmoj de Jára Cimrman kun konsento de Zdeněk Svěrák, kiu eĉ akceptis honoran membrecon. La filmo *Longulo, Larĝulo kaj Miopulo* estis projekciita dum UK 2025 en Brno. Ŝi ankaŭ kreis emblemon por la kongresa kuriero Drako de Brno kaj faris T-ĉemizojn kun tiu motivo.

Jan Řepa (1944), nomata Fidel pro siaj



barbo kaj inklino al humuro, estas legomvendisto kaj amatora aktoro. Li laboris kun infanoj, kun kiuj li vizitadis SET Lančov. Inter la jaroj 1999-2002 li estis estrarano de ĈEA. Kiel ĉeĥa amatora aktoro li ludis en ĝardena korto de kastelo Kratochvíle. En la sama kastelo li ĉiĉeronis esperantlingve en rolo de renesanca nobelo Petr Vok, ĉeĥlingve por la publiko li prezentis doktoron Zamenhof (en Písek kaj Svitavy) kaj por la junulara ensemblo DOMA el Svitavy li ludis verkiston Karel Čapek en teatraĵo *R.U.R. aŭ Terura sonĝo*. Li faris plurajn sonregistraĵojn poeziajn kaj turismajn.

POSTRIGARDO AL NIA UK

En la antaŭa numero de Starto ne povis esti publikigitaj ĉiuj gravaj aferoj pri nia kongreso, tial ni nun daŭrigas.

Honora komitato

Martin Baxa (alta protektanto) – ministro pri kulturo de la Ĉeĥa Respubliko, membro de la Ĉambro de Deputitoj de la Parlamento de la Ĉeĥa Respubliko; origine mezlerneja instruisto

Jan Graubner – ĉefepiskopo de Prago, primaso de Ĉeĥio

Jan Grolich – estro de la Sudmoravia regiono; origine advokato

Jaroslav Maxmilián Kašparů – grekkatolika pastro, psikiatro, pedagogo, esperantisto

Filip Křepelka – estro de la katedro pri internacia kaj eŭropa juroj de la Masaryk-Universitato, universitata profesoro specialiĝinta pri eŭropa juro

Tomáš Kubiček – ĝenerala direktoro de la Moravia Landa Biblioteko; origine literatur-sciencisto, historiisto kaj bibliotekisto

Jan Mareš – rektoro de la Mendel-Universitato en Brno, universitata profesoro specialiĝinta pri fiŝmastrumado

Mesaĝo de la alta protektanto

Bonvenon en la Ĉeĥa Respubliko, bonvenon en Brno!

Mi havas la honoron bonvenigi esperantistojn el la tuta mondo en ilia plej granda renkontiĝo, por kiu ili jam la trian fojon dum la pli ol centjara kongresa historio elektis nian landon.

Esperanto estas escepta kultura

fenomeno, kiu dum la preskaŭ cent kvardek jaroj de sia ekzisto efektive pruvis, ke ĝi estas utila komunikilo por ĉiuj nacioj de la mondo. Reciproka konatiĝo kun kulturaj tradicioj kaj historio, samkiel interhoma interkompreniĝo, estas ekzakte tio, kion oni hodiaŭ, en tempo de komplikaj kaj streĉitaj rilatoj en multaj mondopartoj, pleje bezonas. Mi aprezas, ke ĉi tiu bezono estas plene reflektata en la temo de la ĉi-jara kongreso: Esperanto kaj teknologioj kiel pontoj de paco kaj konfido inter la popoloj. Homoj ja povas trovi komunan lingvon, kaj Esperanto, kiu transiras la limojn de lingvoj, kulturoj kaj ŝtatoj, estas de tio perfekta ekzemplo.

La ideo pri internacia lingvo havas en la Ĉeĥa Respubliko longan tradicion. Jam Johano Amoso Komenio en la 17-a jarcento revis pri universala lingvo, kiu interligus anojn de diversaj popoloj. Via kongreso en Brno, dum kiu kunvenas partoprenantoj el pli ol sesdek landoj sen bezoni interpretistojn, estas reala plenumiĝo de tiu ĉi revo.

La kongresurbo Brno, la dua plej granda urbo de la Ĉeĥa Respubliko, ludas gravan rolon en la ĉeĥa kaj monda kulturoj pro sia riĉa historia kaj arĥitektura heredaĵo. En la urbo troviĝas multaj protektitaj monumentoj, inkluzive de monda heredaĵo de Unesko, kaj okazadas en ĝi tre diversaj internaciaj kunvenoj. Mi ĝojas, ke ekde ĉi tiu jaro ni al ili rajtas alkalkuli ankaŭ la Universalan Kongreson.

Martin Baxa
ministro pri kulturo de la Ĉeĥa Respubliko

Salutletero de Jan Graubner

Estimataj partoprenantoj de la Univerŝala Kongreso de Esperanto,

kun sincera ĝojo mi kore salutas Vin okaze de ĉi tiu escepta internacia kunveno en la urbo Brno – en la koro de Moravio, kiu dum jarcentoj vivas el la riĉeco de fido, kulturo kaj homa solidareco.

Viaj klopodoj por komprenado inter popoloj, por konstruado de pontoj inter kulturoj kaj lingvoj, portas en si profundan valoron, kiu resonas ankaŭ kun la kristana mesaĝo de paco kaj unueco. Esperanto – lingvo, kiu ne naskiĝis el deziro al superregado, sed el deziro al dialogo – estas bela simbolo de tio, ke diverseco ne devas dividi, sed povas riĉigi.

Mi deziras al Vi, ke Via kongreso estu ne nur okazo por faka kunhavigado kaj lingva kresko, sed ankaŭ momento de vera homa renkontiĝo, amikeco kaj espero. Ke Vin akompanu Dia beno, ĝojo kaj kuraĝo porti la lumon de komprenado ankaŭ tie, kie hodiaŭ ŝajnas esti mallumo de miskomprenoj kaj fermiteco.

Speciale mi elpetas Dian pacon por Vi ĉiuj, Viaj familioj kaj la tuta Esperanta movado.

Kun respekto kaj beno,

Mons. Jan Graubner

Ĉefepiskopo de Prago kaj Primaso de Ĉeĥio

Salutletero de Pavel Konzbul

Karaj amikoj de Esperanto,
kiel oni parolos en la ĉielo? Laŭ la Biblio, la ĉiela Jerusalemo estas loko de kompreno kaj komuneco inter homoj kaj

Dio. Sekve, la loĝantoj tie devas nepre paroli inter si per komuna komprenebla lingvo. Ĝi do estos lingvo trapenetrata de reciprokaj amo kaj respekto. Ĝuste je tia lingvo ni komencu labori jam ĉi tie sur nia patrino Tero.

Mia ŝatata brita verkisto Gilbert K. Chesterton diras, ke „la moderna homo estas edukita por kompreni fremdajn lingvojn kaj por ne kompreni fremdulojn“. La celo de la fondinto de Esperanto estis krei lingvon facile lerneblan kaj uzeblan, kiu ne diskriminacius parolantojn el iu ajn nacio. Tio estas la unua paŝo al reciproka kompreno. La renesanca arta geniulo kaj inventisto Leonardo da Vinci estis konvinkita, ke „la plej nobla plezuro estas la ĝojo de kompreno“.

Por ke ĉiuj amikoj de Esperanto kontribuu ĝuste al tia plezuro, por tio mi petas en preĝo.

Mons. Pavel Konzbul
episkopo de Brno

Salutletero de Max Kašparů

Karaj geamikoj, samideanoj kaj gefratoj, mi salutas!

Kiam iu demandas min, kiel karakterizi Esperanton, mi respondas, ke ĝi estas amo inter logiko, beleco kaj simpleco. Ankaŭ hobio kaj bona antaŭzorgo kontraŭ la Alzheimer-demenco.

Kaj kiam iu demandas, kiuj estas la esperantistoj, mi respondas, ke ili estas amantoj de logiko, beleco kaj simpleco, kiuj ne scias, kio estas demenco.

Geamikoj, mi deziras al ĉiuj multe da ĝojo pro nia kongreso en Brno.

Max Kašparů
grekkatolika pastro, psikiatro,
pedagogo, esperantisto

Mesaĝo de la urbestrino

Estimataj geesperantistoj, karaj vizitantoj de Brno,

mi havas la honoron bonvenigi vin en la metropolo de suda Moravio, kie vi laŭ mia espero pasigos neforgeseblan semajnon.

Brno gastigas la Universalan Kongreson de Esperanto por la unua fojo en sia historio (kaj por la tria fojo en la historio de nia lando). Fakte estas mirinde, ke tiel okazas nur nun, 120 jarojn post la unua esperantista kongreso. Ĉar jam en la jaro 1901 en nia urbo kreiĝis la unua oficiala esperantista organizo en la tiama Aŭstrio (kies parto la ĉeĥaj landoj estis ĝis la jaro 1918). Kun la internacia lingvo Esperanto havas do Brno vere multjaran kaj firman rilaton. Kaj tiu nun kroniĝas per gastigo de la plej granda esperantista kunveno en la mondo.

Niaj urbo kaj regiono proponas al vi vere multon. Krom la kongresejo mem kaj loĝlokoj por pli ol milo da kongresanoj temas precipe pri libertempa programo en formo de eksterordinaraj historiaj monumentoj kaj ankaŭ tute nuntempaj kulturo kaj gastronomio.

La plej brilajn juvelojn – la burĝon Ŝpilberk, la katedralon en Petrov, la vilaon Tugendhat aŭ la akvorezervujojn en Ŝlutý kopec – vi spertos per viaj propraj okuloj. Atendas vin ankaŭ tre interesaj ekskursoj al naturaj kaj kulturaj vidindaĵoj en suda Moravio, kaj eĉ en la najbaraj landoj. Brno nome estas perfekta elirpunkto por viziti kaj la ĉefurbon Prago, kaj la historiplenan Vienon kaj la amikan Bratislavon.

Ni prezentos al vi la plej interesajn erojn de Ĉeĥio kaj reciproke pere de vi ni konatiĝos kun viaj kulturoj. Konservado de kultura diverseco kaj sub-

tenado de amikeco, toleremo kaj kompreno inter homoj de malsamaj mondo-partoj ja apartenas al la celoj de Esperanto.

Bonvenon! Estu niaj estimataj gastoj.

Markéta Vaňková
urbestrino de la urbo Brno

Loka Kongresa komitato

Jiří Tomeček (*prezidanto*), Libuše Hýblová (*vicprezidantino, ĝiĉetoj*), Milan Kolka (*sekretario, kongresejestro*), Andrea Švubová (*kasisto*), Miroslava Tomečková (*sponsoroj, partneroj*), Vratislav Hirš (*loĝiga servo*), Jiří Caletka (*kontaktoj kun amaskomunikiloj*), Josef Kalčík (*sociaj retejoj*), Tomáš Břicháček (*kontakto kun landaj aŭtoritatoj*), Marek Blahuš (*kontaktoj kun lokaj aŭtoritatoj*), Leonarda Chaloupková (*artaj aranĝoj*), Jana Zigal (*ekskursoj*), Paulína Jalakšová (*junulara programo*), Monika Kimáková (*infana kongreseto*), Vlasta Piščíková (*volontuloj, helpantoj*), Miroslav Malovec (*kongresa kuriero*), Petr Javorík (*tekniko*).

Kongresa Fakoj

Dorota Rodzianko, Peter Baláž, Sonja Zaretsakaja. **Kunlaborantoj:** Matthieu Desplantes, Linda Le Nepveu, Claire Divoy, Rogener Pavinski, John Huang, Jozef Baláž, Katalin Kováts, Sylvain A.T. Lelarge, Marija Belošević, Anna Löwenstein, Zdravka Boytcheva, Radmila Švejcárová

Reĝisoro de la Kongresa Temo:

Prof. Bengt-Arne Wickström

Esperantologia Konferenco:

Prof. Bengt-Arne Wickström kaj D-ro Klaus Schubert

Rektoro de IKU:

Prof. Věra Barandovská-Frank

Novaj honoraj membroj de UEA

Mireille Grosjean (1946) franclingva svisino, prezidantino de Svisa Esperanto-Societo, iama prezidantino de ILEI (2013-2021), ties honora membro. Instruas afrikajn esperantistojn, verkas, prelegas.



Zsófia Kóródy (1956) diplomigis pri Esperanto en la Universitato Eötvös Loránd en Budapeŝto. Ŝi laboris ĉe Hungara E-Junularo, Hungara E-Asocio, estis vicprezidanto de ILEI, kunlaboris ĉe Hungara-Esperanta Mezvortaro, nun ŝi apartenas al kernaj aktivuloj de la Interkultura Centro Herzberg en Herzberg am Harz, Germanio, kie ŝi vivas kaj laboras.



Jungkee Lee (Ŝlosilo) (1954) plenumis plurajn postenojn en Korea Esperanto-Asocio. En la Komisiono pri Azia Esperanto-Movado li estis membro, sekretario, prezidanto kaj honora prezidanto. En 2022 li ricevis la premion Degučĉi.




Dufoje elektita kiel estrarano de UEA. Esperanton li instruis kiel docento en la universitatoj Dankook, Wonkwang kaj Hankuk.

Michela Lipari (1948) laboris komence ĉe Itala Esperantista Junularo kaj TEJO, estis estrarano de UEA pri Kulturo kaj Kongresoj. En 2004 Sekretario de la Belartaj Konkursoj. De 2014 ĝis 2020 prezidantino de Itala Esperanto-Federacio. Ŝi kunredaktis kaj tradukis plurajn librojn en Esperanto, inter ili: *Instruado*



de Esperanto, IKU-libroj (2001, 2003, 2004); *Pri homoj kaj verkoj*, *Interlingvo inter lingvoj* kaj *Tamen ĝi moviĝas!* En 2023 Michela prezidis LKK de la 108-a UK en Torino kaj kunlaboris por starigo de la Premio Maertens, de kiu ŝi estas sekretario.

Stefan MacGill (1948) nov-zelanda denaska esperantisto. En 1976 li translokiĝis al Roterdamo por volontuli en la Centra Oficejo kiel redaktoro de la *Jarlibro* de UEA. Ekde 1986 li vivas en Hungario. Li redaktis la gazeton *Juna Amiko*, estis prezidanto de TEJO, prezidanto de ILEI, vicprezidanto de UEA. En 2021 oni distingis lin per Premio Deguchĉi. MacGill ankaŭ verkas lernilojn: *Tendaraj Tagoj*, *La Laŭta Vekhorloĝo*, *Tridek Roluloj*, *Streĉ' eĉ*, *Pordoj*, *Okulo*, *Nemave Edifi*, la teatraĵo *Aŭto-mato*.



Miroslav Malovec (1953) estas redaktoro de Starto, fondinto de ĉeĥa Vikipedio per traduko el Esperanto, aŭtoro de *Granda Esperanta-Ĉeĥa Vortaro* kaj *Granda Ĉeĥa-Esperanta Vortaro*, tradukinto de opero Sternenhoch, cifereciganto de literaturo kaj zorganto pri Memoro de la Ĉeĥa Esperanto-Movado. Li enĉeĥigis *Interlingvistikon* de Detlev Blanke, *Novan Realismon* de Bruno Vogelmann (kun Václav Peĉák), kompilis *Gramatikon de Esperanto* por asociaj ekzamenoj, *Bazan ĉeĥan konversacion* (kun Stáňa Chrdlová), rakontojn de Hašek (kun Jiří Patera), Komenion (kun Zdeněk Rusín).



Trevor Steele (1940) aŭstralia esperantisto, instruisto kaj aŭtoro de rakontoj, noveloj kaj romanoj en Esperanto. La verkaro de Steele estas forte influita de vojaĝspertoj akiritaj i.a. en Germanio, Orienta Eŭropo, Azio kaj Aŭstralio, ĉefe pri la problemoj de aborigenoj, ĉe kiuj li laboris en eduka fako dum unu jaro kaj duono. Li verkis gravajn librojn pri la rilatoj inter la aborigenoj kaj la koloniistoj: *Flugi kun kakatuoj*, *Paradizo ŝtelita*, *Sed nur Fragmento*, *Dio ne havas eklezion*. La vivon de Jesuo li bildigis en *Kaj staros tre alte*. Aliaj gravaj verkoj: *Apenaŭ Papilioj en Bergen-Belsen*, *La Fotoalbumo*. Ĝis 2010 Steele estis membro de la Akademio de Esperanto.



Paulo Sérgio Viana (1948) estas unu el la plej eminentaj vivantaj esperantistoj de Brazilo. Li studis medicinon kaj profesie estas kuracisto. En 1965 li kunfondis Gvanabaran E-Junularon. Li kunorganizis la eldonon en 1968 de la libro *Ellernu: progrese kurso de Esperanto*, de D-ro Ferenc Szilágyi. De la plej grava brazila verkisto, Machado de Assis (1839-1908), li tradukis jenajn verkojn: *La alienisto*, *Postmortaj rememoroj de Brás Cubas*, *Dom Casmurro*, *Esav kaj Jakob*, *Helena* – kaj plurajn rakontojn. Li ankaŭ esperantigis *Rakonton pri Nekonata Insulo* de José Samarago. Plurfoja laŭreato de la Belartaj Konkursoj de UEA. Liaj *Dek du rakontoj* estas elŝuteblaj ĉe e-librejo de Sezonoj. Liaj primedicinaj artikoloj aperis en Monato.



Wang Chongfang (1936-2025) estis fama ĉina vortaristo, tradukisto, honora konsiliano de Ĉina Esperanto-Ligo, eksprezidanto de la Zhenjiang-a Esperanto-Ligo. Li tradukis ĉinajn klasikaĵojn, ekz-e: *Profilo de Zhou Enlai*, *Ĉina ceramiko*, *Analektoj de Konfuceo*, *Kamelo Ŝjangzi*, *La militarto de SUN ZI*, *JING PING MEI*, *Yijing aŭ libro de ŝanĝiĝoj*, *Estrado-Sutro de Darmo-Trezoro de la Sesa Patriarko Huineng*. Kiel sperta vortaristo li eldonis du grandegajn vortarojn: *Granda Vortaro Ĉina-Esperanta* kaj *Granda Vortaro Esperanto-Ĉina*.



Wei Yida (1947-2025) estis vicprofesoro pri la anglaj lingvo kaj literaturo en la Universitato Shantoua, ĉefredaktoro de kelkaj literaturaj revuoj en Esperanto kaj fondinto de la retejo "Lernado de Esperanto" en Ĉinio. Liaj originalaj verkoj aperis en diversaj periodaĵoj, ekz-e *Beletra Almanako*, *Literatura Foiro*, *El Popola Ĉinio* k.a. Li elĉinigis klasikajn verkojn de ĉinaj verkistoj en Esperanton: *Familio de Bakin*, *La sieĝata Fortikaĵo*, *Travidebla ruĝa rafano*, *En profunda korto*, *Urbeto ĉe limo*, *300 ĉinaj antikvaj poemoj en Esperanto*.



Rimarkigo: La du grandaj ĉinoj ricevis la honoran membrecon *in memoriam*, ĉar ili forpasis nelonge antaŭ la kongreso.

AKIRI – la strategia plano de UEA por 2025-2030

La nove elektita UEA-prezidanto Fernando Maia Jr. prezentis publike novan strategian planon de UEA, kiun oni nomis AKIRI. Laŭ ĝi UEA havas tri talentojn: **kunligi** (membrojn kaj asociojn), **reprezenti** (ĉe UN, Unesko k.s.), **servi** (provizi servojn por la E-komunumo).

Por kio ni laboras, al kio ni laboras kaj kion ni akiru montras: **misio de UEA** (*antaŭenigi lingvan justecon kaj internacian kunlaboron*), **vizio de UEA** (*strebi al mondo, kie ĉiuj homoj povas dialogi sen lingvaj baroj*), **valoroj de UEA** (*lingva justeco, respekto pri diverseco, kulturo de interkompreniĝo, solidareco, mondcivitaneco*).

La **strategiaj kampoj** de AKIRI: **A**-administrado, **K**-kunlaborado, **I**-informado, **R**-rilatoj, **I**-instruado.

Strategiaj celoj por: **administrado** (*moderniĝo, financa daŭripovo, kunordiga efikeco*), **kunlaborado** (*komunuma reto, kultura kaj scienca fortigo, juneca vigligo*), **informado** (*konsciigo, komunikado, korektado*), **rilatoj** (*politika akcepto, faka aŭtoritateco, ĉies-gajnaj partnerecoj*), **instruado** (*kapabligo, edukada esploro, universitata enradikiĝo*).

Strategiaj programoj: **programoj 101 kaj 1001** (*101 membroj en malfortaj landaj asocioj, 1001 en fortaj*), **verdigi E-dezertojn** (*en landoj sen esperantistoj*), **alianco 365** (*donacprogramo*), **programo Oceanio** (*videbligian movado en la tria mondo*), **FoKuSo** (*subteno de fakoj, kulturo, scienco*).

Prioritatoj por 2025-2030: funkciigi novan membro-sistemon, kreskigi enspezojn, per vendo de la roterdama domo subteni pli efikan oficejan modelon,

kreskigi la konscion pri Esperanto, kreskigi la membraron.



Permesu iom kritiki la planon

Ni ne forgesu, ke homoj lernas fremdajn lingvojn por fari el ili siajn servistojn, precipe kiel **fontojn de informoj** kaj **laborhelpilojn**. Nur unu homo el dek mil volas male fariĝi mem servanto de la lernita lingvo. Nia varbado trafas nur ĉi tiujn esceptulojn, dum la dek mil aliajn ĝi forpuŝas.

Ĉiu ŝtata lingvo por administri siajn lernejojn, industrion, agrikulturon, sciencojn, komercon, politikon kaj oficejojn devis krei **ampleksan literaturon klerigan, fakan, informan, enciklopedian**. Internacia lingvo por administrado de la tuta mondo bezonas tiun fakliteraturan fonon ankoraŭ pli.

Apenaŭ estas elektebla lingvo, kiu estas uzata nur buŝe kaj beletre. Kaj kiu eĉ ne planas la bezonatan fonon krei.

La publiko bezonas vidi, ke ni ne saltetas preskaŭ 140 jarojn surloke, ŝpinante nur belajn teoriojn pri homa kunfratiĝo kaj lingva egaleco. Ne necesas plibonigadi reklamon, sed la preparitecon de Esperanto por ĝia tasko. Alie la homoj ne vidos sencon lerni tian lingvon.

mm

E-mental' en Londono

Fine de septembro membroj de la esperantista klubo E-mental' forflugis al la brita ĉefurbo. La celo de la vojaĝo ne estis nur konatiĝi kun Londono, sed ankaŭ renkontiĝi kun lokaj esperantistoj. Kaj la spertoj estis abundaj.



La unuaj paŝoj kaj la unuaj gustoj
Post la alveno al la londona flughaveno ili veturis per trajno al la junulargastejo, kie ili havis rezervitajn ĉambrojn. Jam survoje aliĝis al la grupo Martin – slovako, kiu jam de multaj jaroj loĝas en Londono kaj volonte fariĝis ilia akompananto. La unuan vesperon li kuniris kun ili al ne malproksima manĝejo, kie ili povis gustumi ne nur la klasikan britan pladon „*fish and chips*“ – fritita fiŝo kun terpomfritoj, kiu tre bongustis al ĉiuj.

Matenmanĝo, kiu surprizis

Matene je la oka horo ili iris al simpla manĝejo por realigi sian deziron – gustumi veran anglan matinmanĝon. Sur la tablo aperis fazeoloj, kolbasoj, ovoj kaj rostita pano. Iuj elektis eĉ pli abundan varianton kun terpomaj trianguletoj kaj tiel nomataj nigra kaj blanka pudingo. Ĉiuj atendis, ke la

pudingo estos dolĉaĵo, sed alvenis io simila al ĉeĥaj tripo- kaj sangokolbaso. „Estis surprizo, sed tre bongusta,“ ĉiuj konsentis. La manĝon kompletigis kafo aŭ teo kun lakto – ĝuste tiel, kiel la angloj trinkas ĝin.



Kun lokaj esperantistoj tra la urbo

Je la deka horo ili devis renkontiĝi kun lokaj esperantistoj. Pro metroa interrompo ili alvenis iom malfrue, tamen Anthony kaj Matt ilin varme bonvenigis. Ĉiuj kune ekiris piede tra la urbo. Ili vidis la Katedralon de sankta Paŭlo, la Monumenton, la Buckinghaman Palacon, la faman Trafalgar-placon...



La promenado daŭris plurajn horojn kaj finiĝis ĉe la Tower Bridge. Ili estis bonŝancaj kaj povis vidi kiel la ponto malfermiĝis por ke venanta ŝipo povu traveturi sub ĝi.

Vespero kun amikoj

La tagon ili finis per vespermanĝo en antaŭe mendita restoracio, kie aliĝis al ili pluaj londonaj esperantistoj. Vigla konversacio ĉe bona manĝo kaj trinkaĵoj daŭris preskaŭ ĝis la dek unua horo.



Fino de la vojaĝo

La sekvan matenon E-mentalanoj ankoraŭfoje ĝuis lastan anglan matenmanĝon kaj poste ekveturis al la flughaveno. Ĉiuj forveturis kun la sento, ke Londono estas tre ĉarma urbo ne nur pro sia atmosfero, sed ankaŭ pro la afableco de la homoj, kiujn ili renkontis. „Estis mirinda vizito, kaj ni certe volas reveni,“ konsentis ĉiuj E-mentalanoj.



Universala Kongreso ĉe najbaroj 1.-8.8.2026

La 111-a UK okazos en la najbara lando Aŭstrio, en la urbo Graz (Štýrský Hradec), kiu estas de slava deveno (graz = grad, hrad).



Estas unika ŝanco partopreni, ĉar venontaj kongresoj verŝajne trovos sian gastiganton pli malproksime.

Iru al la asocia domajno

<https://www.esperanto.cz/cs/akce/111-svetovy-kongres-esperanta-1573.html>

kie vi trovos pli multajn informojn (en la ĉeĥa).

Ĉi-printempe kelkaj ĉeĥoj vizitis la urbon Graz okaze de Aŭstria Esperanto-Kongreso kaj mi povas diri, ke ĝi estas bela kaj interesa urbo. En ĝi eĉ troviĝas **Esperanto-placo** kaj pac-ponto de **Bertha von Suttner**. Oni nomas ĝin ankaŭ la urbo de **Johano Kepler**, ĉar la glora matematikisto ĉi tie studis kaj instruis antaŭ foriro al Prago.

Trajna vojaĝo el Prago tra Brno kaj Vieno daŭras 7 horojn kaj kostas inter 1400 ĝis 2600 Kč (dependas de elektita trajno, sezono kaj antaŭmendo).

Laŭ <https://uea.org/kongresoj> jam aliĝis 362 personoj el 47 landoj kaj aperis la Unua Bulteno. Nun plej favora kotizo validas ĝis fino de marto.

mm

Vuk Echtner (1905–1994)

Vivo por Esperanto, nevidantoj kaj bahaismo



Vuk Echtner naskiĝis en Ronšperk (nun Poběžovice) apud Domažlice en ĉeĥan familion (ofte erare indikata kiel miksitaj german-ĉeĥa) kiel sesa el 13 gefratoj. Li estis baptita Wolfgang (laŭ sia baptopatro). Poste li ŝanĝis la nomon al la slava Vuk.

La patro Josef Echtner, profesie fervojisto, venis kun sia familio al Poběžovice kiam oni konstruis tie la fervojan linion kiel la unua ĉeĥa familio en komplete germanan loĝantaron.

Poste tiel venadis pluraj ĉeĥaj familioj. Iniciatite de la gepatroj de Vuk, Nacia unuiĝo de Ŝumava regiono (*Národní jednota pošumavská*) fondis la minoritatan lernejon.

Vuk konatiĝis kun Esperanto en la jaro 1912 en la gazeto *Mladý čtenář* (Juna leganto), en kiu aperis la kurso de Julie Šupichová. En la jaro 1920 (15-jara!) li fondis por la ĉeĥa minoritato bibliotekon, ankaŭ sub la tegmento de la Nacia unuiĝo de Ŝumava-regiono.

Jam junaĝe Vuk interesiĝis pri fremdaj lingvoj. Krom la germana kaj Esperanto li ellernis la rusan kaj la anglan, sed krome ankaŭ la ĉeĥan kaj germanan stenografiojn.

Kiel 17-jara li eniris Pragon, kie li tuj membriĝis en la Praga Esperanto-klubo kaj sub influo de Vasilij Eroŝenko, kiun li renkontis dum la UK en Nurenbergo, kaj post amikiĝo kun K. E. Macan li komencis intensive helpadi al nevidantoj. Li instruis al ili Esperanton en la instituto Klar kaj kunlaboris kun Macan por de li fonditaj biblioteko kaj presejo por nevidantoj. Inter liaj lernantoj estis ankaŭ la fama komponisto Jaroslav Ježek.

Post la morto de Macan transprenis Vuk Echtner la ĉefredaktoradon de la gazeto *Aŭroro* en brajla skribo, kion li daŭrigis dum 47 jaroj.

Li verkis aŭ brajle transskribis 52 diversajn lerno- kaj legolibrojn en diversaj lingvoj, ĉefe en Esperanto.

En praga klubo li konatiĝis kun bahaismo kaj ekinteresiĝis pri ĝi, pleje pri ĝia rilato al paco. En majo 1926 Pragon vizitis la usona esperantistino kaj bahaistino Martha Root kaj Vuk Echtner interpretis dum ok tagoj de ŝia restado ŝiajn prelegojn.

Kun ŝi li preparis la komunan publikaĵon *Bahaaj sciencaj pruvoj pri postmorta vivo*, kiun li eldonis kaj donacis por ĉiuj ĉeestantoj de la UK en Gdansko.

En la jaro 1932 Vuk kun Martha Root partoprenis la kongreson de la ĉeĥaj esperantistoj kaj inaŭguron de la Esperanto-monumento en Olomouc.

En la jaro 1958 li estis kondamnita pro *Membreco en kontraŭleĝa, al la ŝtato malamika organizaĵo Bahaismo* al tri jaroj kaj duono da malliberigo.

En la jaro 1960, post 24 monatoj, danke al amnestio li estis liberigita, tamen plu ĉikanita. Por ne esti je okuloj de StB li kun sia familio forlasis Pragon kaj revenis al sia naskiĝregiono Ĥodio (Chodsko).

En la jaro 1974, post pluraj apelacioj, li sukcesis akiri, ke la verdikto ne plu validu, sed ĝian nuligon dekomence kaj partan rekompencan li atingis nur en la jaro 1991.

Post sia liberiĝo li daŭrigis sian diligentan laboron por nevidantoj kaj esperantistoj. Ene de ĈEA kiel sekretario de pedagogia sekcio, poste ĝia gvidanto, plue prezidanto de Lingva komisiono kaj ekzamenanto dum lingvaj ekzamenoj, sed nelaste ankaŭ oferema instruisto de Esperanto. Li instruis distance laŭ memfaritaj korespondaj kursoj, sed ankaŭ en la gimnazio en Domažlice.

Li tradukis al Esperanto verkojn de J. Š. Baar, A. Jirásek, J. Zeyer, H. Malířová, Fráňa Šrámek, A. M. Tilšová, J. Vrba, J. F. Hruška a R. R. Hoffmeister. EK Třebíč eldonis en la jaro 1991 libron de liaj tradukoj el Ĉeĥoslovaka Antologio kun la titolo *Sep tradukoj*.

V. Echtner ankaŭ tre interesiĝis pri historio, luzacia malplimulto kaj sorabaj lingvo kaj kulturo. Li prelegis en 1945, laŭ indiko en Soraba gazeto (*Lužicko-srbský věstník*), prie minimume dufoje: en Prago *Pri luzacia lando kaj ĝia popolo* kaj en Pilseno *Pri Luzacio kaj ĝia batalo por libereco*.

Kun la helpo de sia edzino li gvidis kronikon en Díly kaj sekve, en la domo por pensiuloj en Domažlice, ankaŭ tie.



Krome, li kunlaboris kun la regiona arĥivo en Pilseno, kien li trandonis sian postlasaĵon kaj ĝi nun tie troviĝas en 57 dikaj A3-dosieroj zorge prilaboritaj kun detala listo de unuopaj enhavoj. Laŭ tiu listo mi prunteprenis kelkajn plej interesajn, sed ene de du duontagoj, kiujn mi tie trapasis, mi kompreneble povis ekscii nur fragmentojn de lia vivo.

Necesas mencii, ke V. Echtner estis ankaŭ diligenta publicisto, precipe en la populara semajnfina gazeto *Masarykův lid* (Popolo de Masaryk) kaj monatgazeto *Sbratření* (Kunfratiĝo) eldonata de Přemysl Pitter.

Por sia agado li estis honorigita: de SONS per Medalo de Emilie Suchardová (nevidanta verkistino kaj esperantistino) celanta la plej elstarajn agantojn por nevidantoj; de ĈEA kiel honora membro kaj de Mondpaca Esperantista Movado per honora emblemo.

En la jaro 1991 li festis kun sia edzino „Toni“ diamantan nupton (60 jaroj de geedzeco) kaj en januaro 1994 Vuk Echtner forpasis.

Fine mi petas pliaĝulojn, kiuj lin konis, pri iuj rememoroj, ĉu gajaj, ĉu lernigaj, por la libro pri Vuk Echtner, nuntempe de mi preparata.

Petro Chrdle
chrdle@kava-pech.cz

Surspure de doktoro Zamenhof en Duszniki-Zdrój (daŭrigo)

Posttagmeze ni sukcesis ankoraŭ superi krutan deklivon kaj ĉe la montara kabano "Sub muflono", kun belega panoramo de la montara pejzaĝo, frandante ni ankoraŭ kune kantis kaj amuziĝis kaj firmigis nian amikecon. Ni adiaŭis varmkore kun la deziro pri ripeto sekvontjara. Dankon al ĉiuj, kiuj venis!

Historia mistero malkovrita kaj esplorata

Sed gravis ankaŭ ekkono de la lokoj lititaj kun la restado de d-ro Zamenhof, sur kies spuroj ni paŝis. Kiel konate, en la urbeto ekde 1931 staras ŝtona monumento omaĝe al li. Tie ni rememore kantis "*Mi volas danki vin, sinjoro Ludoviko*" kaj mian muzikigon de la poemo de lia frato Leon "[Ĉu estas land'?](#)" (kiun mi instruis i.a. dum la UK en Brno) kaj ankaŭ kune laŭtlegis belan poemon, verkitan por la tiama inaŭguro.



Tamen montriĝis, ke la najbara Hotelo de Esperanto NE estas tiu, kie loĝis doktoro Zamenhof!

Kvankam en la gazetaro kaj aliloke ja estis skribite, ke la monumenton oni starigis antaŭ la koncerna vilao. Teresa montris al ni la ĝustan domon ne tute apude. Kaj ni vere trovis rande de la iom neglektita ĝardeno reston de la ŝtuparo,

kondukinta al la ŝtono. Kio, kiel kaj kial okazis? Tion ni parte nur poste komencis malplekti kaj kompreni. Sed nun mi ankoraŭ volas pluesplori la temon kunlabore kun la Urba Muzeo. Pri la rezultoj mi provos informi espereble sekvontjare printempe.



Evoluigo de internaciaj kontaktoj

Indas aldoni, ke Silezia Esperanto-Asocio plurkampe aktivas kaj en la turisme alloga regiono de Klodzko ĉe la landlimo kun Ĉeĥio okazigas ĉiujare kutime en septembro bonkvalitajn semajnajn [internaciajn feriadojn](#) kun lingvo-kursoj kaj bunta ekskursiva, kultura kaj amuza programo. La organizantoj bedaŭras, ke proksimaj ĉeĥoj ankoraŭ ne trovis vojon al ili.

Ripete la aranĝo okazis ankaŭ en Duszniki-Zdrój, ĉi-jare inter 13. kaj 20.9. ĝi trapasis en la ne malpli bela kuracloko Łądek-Zdrój.

Planante vian event. vojaĝon al la nepre vizitinda urbo [Vroclavo](#) vi estas bonvenaj antaŭanonci vin kaj renkonti lokajn esperantistojn.

Retejo: <https://sea-vroc.eu/>

Kontakto: pomer@wp.pl

[Paĝo en Facebook](#)

*Pavla Dvořáková, EK Písek
fotofotoj -pd- kaj SLEA*

Por iom distri

Komparon de ĉeĥaj kaj esperantaj frazeologiaj esprimoj el la libro *La edzino de l' tempvojaĝanto* preparis Mirka Tomečková.

Sevřel se mi žaludek Mia stomako buliĝas
Madam Netýkavka fraŭlino Netuŝumino
Kouřili jointa Fumis rulaĵon
Úžasná blondýna Frandinda blondulino
Videl jsem ji výstřihem až do kuchyně
Ŝia dekoltaĵo defius plonĝiston
Točila se mi hlava mi sentas min vertice
Je mi šoufl mi iom misformas
Utahovali si ze mne Ili molestis min
Tam se chodí....To.... Kuŝi kaj tuŝi
Koketovala se mnou Flirtas sed ne finas
Zvýrazňovač Feltkrajono
Supermarket Ĉiovendejo
Barmanka verŝistino
Zvážil jsem své možnosti Mi trakribris miajn elektojn
Zhluboka se napít eltrinki longan tiron
Linka kuchyňská kuireja stablo
Dala mu nůž na krk Tiras fingron tra lia gorĝo
Nedopečené koláče Subbakitaj kukoj
Chodíme spolu Ni amindumas
Vymóděnej Diable vestita
Kručí mi v břiše Borborigmas
Jsem pitomej mi estas sencerba
Cena za jeho společnost představovala
neustálý oblak dýmu ...prezo pagenda estas mariniĝi en fumo
Odemknout šperhákem Hakmalfermi seruron
Viděl mi až do žaludku Konas min kiel propran poŝon
Poplácal ji po zadku Pugotrafis ŝin
Bezpečnostní sklo sekurvitra luko
Chová se k ní hrozně Li mistraktas ŝin
Vyspal se s každou, která nevylezla na strom Li fikis kun ĉio kun truo ĝustaloke
Přihrádka v autě Gantofako
Potíže s odmítáním třetí sklenky ne sentus rimorson pri la tria

Budu šňupat heroin Pafos al mi heroinon
Na tady a ted' (přípitek) Al la jeno kaj nuno
Seřvat mne můžeš později Lecionu al mi pli poste
A. měla slabost pro J. Koro de A. fandiĝas por J.
Poskytnout první pomoc Apliki KPR (koro-pulman revivigon)
Pach vosku a vlhkých kabátů Odoras vakson kaj malsekajn mantelojn
Odprejskni forfikiĝu
Hučet jako do dubu mortbabili iun
Budeš si myslet, že mi přeskočilo vi kredos min freneza
Erární mýdlo institucia sapo
Narazil jsem na někoho... Mi stumblis je....
Rozpuštěné vlasy Loza hararo
Rozpačítý potlesk Magra aplaŭdo
Prokličkovali meandre vojis
Ministrant altarknabo
Vyplivlo mne to jako blbou pecku Merda globeto de fliperludo
Naprostej blbec kia kacokapo
Když ho provokuješ, vrátí ti to. Se vi pikas lin, li repikos
S tátou nevycházíme ni neniom kunagas unu kun la alia
Vyklouzla jsem z objetí mi malplektis min disde Henry
Zástěrka kamuflejo
Proč ty tajnosti? Pri kio vi sekretumas?
Oči vylezly z důlků okuloj globiĝis
Tak o co jde? Kia tubero en la afero?
Na nic nezapomeň ne maltrafu ajnan eron, gajnu tiel la ceteron
Mávla rukou nad poklonou Ŝi forgestis la komplimenton
Hrdlo se mi sevřelo Mi sentas nodon en la gorĝo
Rozpustná káva Tujkafo
Dohlží tenas lin sub observo
Nebo si tě najdu aŭ mi revenos hanti vin
Prosadit si svou trabati sian volon
Ztratit nervy perdo de sinrego
Skvělé načasování perfekta tempumo
(*daŭrigo eble venonte*)

Burna Teatro de muziko kaj poezio AGADIR

Por la burna 110-a UK estis preparita prezento de *Teatro de muziko kaj poezio AGADIR* kaj de ĝia nunjare preparita video. Pro la plenŝtopita programo ne restis por la programero libera loko. Tamen pro la orientiĝo de agado de la Teatro, kiu proksime rilatas al idealoj de Esperanto, mi opinias, ke indas konatigi esperantistaron ĉi tie kun ĝi.

Unu el labormanieroj de la Teatro estas iom nekutima. Ili invitas dum la jarsezono tri eksterlandajn poetojn, kiuj estas en sia lando persekutataj aŭ estis arestitaj pro sia konvinkiĝo, aŭ eĉ vivas en ekzilo. El ilia poezio oni preparas kaj prezentas teatraĵojn, en kiuj rolas neprofesiaj aktoroj, kaj fine de la sezono estas el ĉi tiuj teatraĵoj preparita video. La nunjaran vi povas spekti per Youtube ĉe: <https://youtu.be/4edftFu4KM>, titolitan *Sur ondoj de espero*.

En ĝi partoprenas Siarhiey Prylucki, belorusa poeto malaprobanta maljustan atencon de Ukrainio, Waldo Rojas, ĉilia poeto kondamnanta ĉiun ajn agresemon kaj Igor Pomerancev, rusa poeto kondamnanta atakon de Putin al Ukrainio. Haveblas esperantaj subtitoloj, preparitaj de burnaj esperantistoj, sed necesas ilin mane elekti en la agordoj. Originaj subtitoloj, kiam parolas aktoroj, estas en lingvo de la poeto, kiam parolas poeto, estas en la ĉeĥa. Post spektado de la video vi povas sendi viajn opiniojn al: jvojesp@gmail.com.

Teatro de muziko kaj poezio ekestis en la jaro 1965 kiel studenta teatro ĉe gimnazio en orientmoravia urbeto Valaŝské Klobouky (Valaĥiaj Ĉapeloj).

Fondintino kaj arta gvidantino estas profesorino de ĉeĥa lingvo Milena

Fucimanová. Jam en la sekva jaro 1966 la ensemblo venkis en distrikta konkuro kaj partoprenis regionan konkuron en Burno. Ĝi prezentis muntadon de poemo *Agadir* de sveda aŭtoro Artur Lundvist kaj fragmentojn el novelo de Romain Rolland *Petro kaj Lucia*. Ĉi tiu cirkonstanco alportis por la studenta ensemblo ankaŭ la nomon, kiun ĝi portas ĝis hodiaŭ.

La agado de la Teatro estis tre abunda kaj varia, estus longa listo prezenti ĉion. En naŭdekaj jaroj la ensemblo translokiĝis el Valaŝské Klobouky al Burno, ĉar ĝia fondintino, vortoverkistino kaj reĝisorino komencis instrui en Episkopa gimnazio en Burno. De tiam Agadir dediĉas sin al poezio de aŭtoroj, kiuj ne povis libere publikigi, kun novaj membroj de la ensemblo el studentoj de la gimnazio.

De la jaro 2008 ĝi dediĉas sin precipe al la projekto *Agadir prezentas...* Temas pri muzike poetikaj programoj de nuntempaj poetoj.

Josef Vojáček.

Kongresaj salonoj en UK

ricevis nomojn laŭ mondaj kaj lokaj gravuloj: Josef Cink (1933–2011), Renato Corsetti (1941–2025), Theodor Čejka (1878–1957), Claude Gacond (1931–2024), Otto Ginz (1896–1976), Hector Hodler (1887–1920), Karel Höger (1909–1977), Theodor Kilian (1894–1978), Ivo Lapenna (1909–1987), Věra Podhradská (1939–2019), Stanislav Schulhof (1864–1919), Eva Seemannová (1920–1999), Eli Urbanová (1922–2012), Lazaro Ludoviko Zamenhof (1859–1917).

El Esperantujo

Novaj akademianoj

Estis elektitaj 9 novaj akademianoj: Eckhard Bick, CHO Sung Ho, Birke Dockhorn, GONG Xiaofeng (Arko), Abel Montagut, Jorge Rafael (Rafa) Nogueras, Jukka Pietiläinen, Maria Rosaria (Sara) Spanó kaj José Antonio Vergara.

Nova estraro de TEJO

La Komitato elektis la Estraron de TEJO por la **mandato 2025-2026**. La nova teamo ekoficis la 1-an de septembro. Sukceson!

Prezidantino: Ana Ribeiro,

Vicprezidanto: Ikvero Almeida Silva

Ĝenerala Sekretario: Snehaja Venkatesh

Kasisto: Mihary Andrianirina

Estrarano: Alexandre Basque

Estrarano: Espoir Ngoma Kasati

IJK venontjare en KATALUNIO

IJK okazos de la **9-a ĝis la 16-a de aŭgusto 2026**, en kongresejo apartenanta al la urbeto Tiana, tre proksima al la ĉefurbo de Katalunio, Barcelono. IJK 2026 estos speciala ankaŭ pro unika sperto kiun ĝi proponos al ni: la 12-an de aŭgusto vespere oni povos spekti plenan suneklipson, kiu videblos preskaŭ nur en Iberio.

Studprogramo de EU instruos pri Esperanto en ok universitatoj

Laŭ informo de la retejo Libera Folio ok universitatoj instruos Esperanton enkadre de projekto Erasmus. La programo estas kunordigita de la Universitato de Tours (Francio) kunlabore kun Universidad de Sevilla (Hispanio), Universitāt Bamberg (Germanio), Universitāt

degli Studi di Parma (Italio), Universiteit van Amsterdam (Nederlando), Boğaziçi Üniversitesi (Istanbul, Turkio), Universiteit Gent (Belgio) kaj Universitatea din București (Rumanio). La kurso celas enkonduki studentojn en la lingvon Esperanto kaj en ĝian esplor-sferon.

La 63-a universitata pripensado

Zohre Ramezani, profesoro de la persaj lingvo kaj literaturo, prezentis detalajn lumbildojn pri la historio de la instruado de Esperanto en iranaj universitatoj. Ŝi respondis al la priaj demandoj de la publiko, kune kun Ahmad Mamduhi, kiu klarigis kiel li sukcesis kapti la intereson de pluraj universitatoj pri Eo-kursoj. Fransoazo (Françoise) Noireau parolis pri sia grandega plujara laboro pri la organizado de Esperanto-kursoj pere de *WhatsApp* por universitato Espoir de Kongo.

Esperanto-Arkivo IEspA en la belga urbo Diest

Fine de 2024 la kolekto konsistis el 8.171 plenaj revujaroj (de 990 titoloj); (almenaŭ) 5.195 neplenaj revujaroj (de entute 1.508 titoloj); 15.602 malsamaj titoloj de libroj kaj broŝuroj; 281 dokumentaroj. <http://iespa.eu/>

SAT kongresis en Francio

En aŭgusto 2025 en la kastelo Greziljono okazis SAT-kongreso kun kultura, prelega kaj ekskursaj programoj. Partoprenis pli ol kvardek personoj. Oni traktis ankaŭ renovigon de la SAT-retejo kaj kunveno pri la situacio en Afriko. Ekskursoj gvidis al trogloditoj en Anĵu kaj al fungokultivejo.

Tři roky ve výboru

(pokračování z minulého čísla)

Reklama na Facebooku – oba kurzy pro začátečníky jsme propagovali placenou reklamou na Facebooku – s čímž pomohla Pavla Dvořáková. Reklamu tak viděli i lidé mimo prostředí esperanta – rozšiřuje tak povědomí o esperantu mezi širokou veřejností – což je činnost, kterou ČES v minulosti prakticky nevyvíjel. Tento druh online inzerce byla pro svaz úplně nová věc, se kterou nikdo z výboru neměl zkušenosti. Efektivnost každé placené reklamy shrnuji v krátké prezentaci výboru. Máte-li zájem o bližší informace, kontaktujte mne.

Reta Babilado – jak rozvíjet znalosti lidí, kteří projdou kurzem pro začátečníky, ale nemají možnost esperantem mluvit? Inspirovala mne práce Radmily Švejcárové, která v Praze organizuje setkání zájemců o esperanto, kde p. Radmila vytváří příjemný prostor pro mluvení jen v esperantu. Spolu s ní a dalšími dobrovolníky Petrem Miňovským, Mirkou Tomečkovou a Jarkou Malou jsme vytvořili skupinu “moderátorů” pro pravidelná úterní online setkání, kdy moderátor pomáhá s neznámými slovíčky a hlídá, aby se dostalo s mluvením na všechny. S moderátory i účastníky ideální formu stále ladíme, ale ohlas na Reta Babilado je velmi pozitivní, takže pokračuje i v aktuálním školním roce. Pokud vás práce moderátora zajímá nebo chcete vědět víc, ozvěte se mi.

Jak vidíte, podařilo se za 3 roky mnohé. Ale nebylo by to možné bez aktivního

zapojení řady z vás. Děkuji vám všem, kteří věnujete svůj volný čas, nadšení a dobrou náladu esperantskému hnutí a aktivně podporujete jeho další rozvoj. Na vás totiž hnutí stojí a zejména díky lidem jako vy se esperanto předává z generace na generaci.

Bohužel, během práce ve výboru jsem se setkal i s nepříjemnou zkušeností – naštěstí ojedinělou. Jiný dobrovolník o mně šířil nepravdy, nařčení o smyšlených důvodech mého jednání a překrucoval mé záměry či výsledky práce. Na toto chování jsem dotyčného několikrát upozornil, avšak ke změně nedošlo. Je tedy pro mne velmi problematické s takovými lidmi nadále spolupracovat.

Všichni dobrovolníci dělají práci pro esperanto ve svém volném čase, ze svého přesvědčení. Mají-li být za svou práci očerňováni a pomlouváni, je to dle mého špatně a nikdo z nás si takové jednání nezaslouží a nemá zapotřebí. Konstruktivní a věcná kritika je potřebná a vítám ji. Pokud byste měli pocit, že jste manipulativnímu jednání v rámci esp. hnutí vystaveni, prosím obraťte se na lidi, kterým důvěřujete a neváhejte kontaktovat nás ve výboru. Může se jednat o nedorozumění, ale také se může jednat o toxický vzorec chování, které hnutí škodí. Dobrou zprávou je, že lidí s tímto komunikačním stylem jsem potkal v českém esp. hnutí zlomek – ostatní spolupráce byla na skvělé úrovni. Proto o tom píší – jaké prostředí si společně vytvoříme, takové je budeme mít.



Méně se podařilo nějakým způsobem zahájit **spolupráci s mládeží** - většina bývalých členů mládeže je neaktivní a žádnou organizovanou činnost nepodnikají. Přiznám se, že i s ohledem na výše uvedené aktivity jsem se z kapacitních důvodů už do ničeho dalšího nepouštěl. Pokud by někdo měl nápad a je ochoten jej aktivně rozvíjet, prosím kontaktujte výbor.

Migrace webu Muzea esperanta ve Svitavách - byla to první má zkušenost s tvorbou webu ve WordPressu, stálo to mnoho hodin učení a hledání vhodného řešení spolu s Jirkou Tomečkem a později velmi významně pomohl Petr Javorik. Ručně jsem migroval všechny akce, které v muzeu od jeho založení proběhly. Web je nyní hotový, funguje, akce svitavského klubu vkládá Miroslav Sýkora. Bohužel, na nějaké další koncepční rozvíjení webu osobně nemám kapacitu.

Databáze členů - povedlo se ji předat nové účetní Andree Švubové, nicméně jde o aplikaci, která využívá velmi staré prostředí (pro IT pamětníky: MS-DOS). Diskutovali jsme s Jirkou Tomečkem a Petrem Javorikem možnou náhradu, ale nebyly kapacity navrhnout modernějšího nástupce. Vše funguje, ale modernější aplikace by přišla vhod.

Další věc, na kterou se v minulých letech moc nedostalo, bylo rozšiřování povědomí o tom, jak výbor funguje a co dělá. Zavedli jsme do Starta rubriku "Co dělá výbor", na konferenci ČES jsme zavedli méně formální setkání s členy výboru "Káva s výborem", ale i tak myslím, že je potřeba vás, členy ČES a příznivce esperanta, více informovat. Aby to nebylo "členové vs výbor", ale aby drtivá většina vás - členů - rozuměla

tomu, co děláme a proč to děláme a dávalo vám to smysl. Věřím, že k tomu přispěje i tento článek a pokud ne, prosím ozvěte se. Otevřená komunikace je základ úspěchu.

Tři roky ve výboru pro mne přinesly hodně nového. Společně stavějme na tom, co nás naplňuje, baví a co posouvá esp. hnutí vpřed. V uplynulých 3 letech se nám to díky dobré spolupráci s mnohými z vás dařilo velmi dobře. Bylo to možné díky velmi dobré komunikaci, odvaze a nadšení nás všech. **Velké díky za to vám všem** a těším se na další spolupráci!

Mgr. Josef Kalčík
kalcik@esperanto.cz
Kontakt na výbor:
komitato@esperanto.cz

Pritakso de la kongreso

Bone funkcii: la akceptejo, manĝejo (sen biletoj), libroservo, senpaga publika transporto, artaj programoj, ekskursoj, prelegoj, kunlaboro kun radio, televido, botanika ĝardeno kaj stelobservejo.

Negativoj: malfrue ricevataj informoj de UEA, kelkaj Nepalanoj kaj Afrikanoj ne ricevis vizon, necesejoj estis nur en unu konstruaĵo, libroservo havis problemon kun pagado per karto.

Kion ni lernis: ke eblas pruntepreni porteblan pianon, ke komunikado al esperanta kaj neesperanta publikoj tre diferencas, ni komencis uzi Eventan Servon kaj grafikan programon Canva.

reta diskuto de LKK (24.11.2025)

ALVOKO AL PARTOPRENO EN LA 77-A OKAZIGO DE LA BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA

Geamikoj, en nia alvoko al partopreno en BK-2024 ni esprimis nian fortan surprizon pro tio, ke ni ricevis nur 110 konkursaĵojn. Temas pri 70 verkoj malpli ol en 2023, 63 malpli ol en 2022 kaj 76 malpli ol en la rekorda jaro 2021. Nu, en 2025 la partopreno en BK iel rekaptis la averaĝan pulson de la lastaj jaroj. Oni ricevis 163 konkursaĵojn, nome 53 verkojn pli ol en 2024, 10 malpli ol en 2022, 12 pli ol en 2020 ktp. Krome, ili venis el la kvin kontinentoj kaj ilia averaĝa kvalito estis pli ol estiminda. Se paroli nur pri la branĉo “Teatraĵo”, en 2024, la unusola verko ĉi-branĉe konkursinta ricevis la trian premion; en 2025, tamen, estis aljuĝitaj la tri ĉefaj premioj plus unu honora mencio. Aparte gravas kaj rimarkindas la ĉi-branĉa aljuĝo de la unua premio, se oni konsideras la fakton, ke, en la lastaj 25 jaroj, tio realiĝis en nur 4 okazoj. Cetere, en BK-2026 la subbranĉo “Monologo aŭ Skeĉo transiĝas al la kategorio branĉo sub la nomo “Mallonga Teatraĵo (monologo, skeĉo ktp)”.

Aliflanke, en BK-2026, ni enkondukas la subbranĉon “Sciencfikcio kaj Fantasto”, kies unua premio havas la nomon “Premio Charles Power”, omaĝe al la samnoma iama Konstanta Kongresa Sekretario de UEA, verkisto, tradukisto kaj ŝatanto de scienco kaj sciencfikcio, kiu forpasis en aprilo 2025.

Niaflanke, kiel kutime, ni fidus la altirpovon de BK, la plej prestiĝa el la literaturaj konkursoj en Esperantujo, en kiu kutime partoprenas tiel grandaj figuroj de la E-beletro kiel entuziasmaj

talentaj komencantoj sur la literatura tereno. Laŭlonge de la historio de BK, tiessine ŝprucis elstaraj individuaj kultivantoj de la E-literaturo kaj propralume brilaj grupoj el ili, kiuj nepre famiĝis. Pro ĉio ĉi, kaj pro multaj aliaj bonoj, ni esperas, ke la partopreno en BK-2026 tenos sin kvante kaj kvalite altnivela kaj eĉ atingos iun aŭ kelkajn el la de ĝi spertitaj lastatempaj eksterordinaraj rekordoj. Ek do al konkursad’!!!

La rezultojn oni anoncos kadre de la 111a Universala Kongreso de Esperanto en Graz (Aŭstrio). Kiel kutime, partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al aliĝo al la UK. La konkursaĵoj devas esti neniam antaŭe publikigitaj en ajna formo, krom en la branĉo Infanlibro de la Jaro. Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo aŭ subbranĉo. Endas sekvi jenajn regulojn:

Poezio: maksimuma longo ne fiksitaj.

Prozo: maksimuma longo 200 x 65 karakteroj (kvino da paĝoj).

Mikronovelo: (maksimuma longo 100 vortoj). La unua premio nomiĝas *Premio Paula Adúriz*.

Sciencfikcio kaj Fantasto: maksimuma longo 200 x 65 karakteroj (kvino da paĝoj). La unua premio nomiĝas *Premio Charles Power*.

Teatraĵo: maksimuma longo ne fiksitaj.

Mallonga teatraĵo (monologo, skeĉo, unuaktaĵo ktp): (daŭro inter 10 kaj 15 minutoj). La unua premio nomiĝas *Premio María Cuevas*.

Eseo: teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo, proksimuma longo 400 x 65 karaktroj (deko da paĝoj). La unua premio nomiĝas *Premio Luigi Minnaja*.

Infanlibro de la jaro: originala aŭ tradukita libro por infanoj presforme aperinta en 2024. Aljuĝata estas nur unu premio.

Kantoteksto: maksimuma longo ne fiksita.

La absoluta limdato por ricevo de konkursaĵoj estas la **31a de marto 2026**.

Oni sendu po unu tajpitan ekzempleron de ĉiu konkursaĵo – krom en la branĉo Infanlibro – al *Belartaj Konkursoj de UEA*, ĉe *Miguel Gutiérrez Adúriz*, prefere retpoŝte al unu el jenaj adresoj: belartajkonkursoj@gmail.com; bk@co.uea.org; aŭ, se tio ne eblas, papere al la adreso: *los Coterros 1-C, 2 Izda, 390600 Muriedas; Cantabria; Hispanio*, indikante la elektitan pseŭdonimon por gardi la anonimecon de la aŭtoro. Por la branĉo Infanlibro oni sendu unu ekzempleron de la koncerna libro al la adreso de *Miguel Gutiérrez Adúriz* kaj tri ekzemplerojn al *Ionel Oneț, Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando*.

Premioj: En la branĉoj *Poezio, Prozo, Teatraĵo* kaj *Eseo*, kaj en la subbranĉo *Sciencifikcio kaj fantasto*: unua premio 260 €, dua premio 182 €, tria premio 104 €. En la branĉo Infanlibro de la Jaro 546 €. En la branĉoj *Mikronovelo, Kantoteksto* kaj *Mallonga teatraĵo (monologo, skeĉo, unuaktaĵo ktp)*: unua premio 100 €, dua premio 25 €, tria premio 25 €. Cetere, la teksto

ricevinta la unuan premion en la branĉo *Kantoteksto* estos muzikigita, kaj la rezulta kanto estos diskonigita en ludado fare de kantisto aŭ kantogrupo.

Detala **regularo** troviĝas en la [retejo](#) de UEA. La verkoj de la Belartaj Konkursoj, premiitaj en 2026, legeblas en la volumo *Belarta rikolto 2026*, eldonota de Mondial. La premiolistoj ekde la komenco de la Belartaj Konkursoj en 1950 troviĝas ĉi tie:

<http://esperanto.net/literaturo/bk/index.html> .

Miguel Gutiérrez Adúriz
Sekretario de la Belartaj Konkursoj
de UEA

LA PLEJ BONA REGANTO DE ESPERANTO EN 2025

Okaze de la KER-ekzamenoj de la 110-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Brno, UEA lanĉis la konkurson

“**La plej bona reganto de Esperanto**”, al kiu invitis la C2-nivelajn kandidatojn, kiuj sukcese trapasos kaj la skriban kaj la parolan partojn de la ekzameno.

El inter la 15 ekzameniĝintoj **8 personoj el 6 landoj anoncis antaŭ la ekzameno sian intencon partopreni la konkurson**. La ekzameno okazis la 1an de aŭgusto, parte en Brno, en ĉeesta formo kaj paralele ankaŭ rete. Papere ekzameniĝis entute 12 personoj kaj rete 3.

Post la korektado kaj poentumado la subaj du kandidatoj havis la plej bonajn rezultojn.

La konkurson gajnis **S. Aleksandra SATO** el Usono (119.6 poentoj),

La duan premion gajnis **Luis Miguel Obando Tobar** (110.7 poentoj).

UEA INVITAS PRELEGI EN IKU 2026 EN GRACO (GRAZ)

La konata astrofizikisto Amri Wandel, ĉefa motoro de la scienca agado de UEA, komunikis al la Estraro de UEA sian decidon rezigni pri sekretariado de la Internacia Kongresa Universitato (IKU) – tamen li restos membro de la [IKU-komisiono](#). La nova estraro transdonis tiun taskon al José Antonio Vergara, iama estrarano pri scienca kaj faka agado. Ĉilia medicinisto, li jam delonge membras en la IKU-komisiono kaj mem prelegis kelkfoje en IKU. Laŭ la bona etoso de la plurjara kunlaboro inter prof. Wandel kaj d-ro Vergara, la nova IKU-sekretario profitos de la konsiloj kaj helpo de prof. Wandel, kiel jam interkonsentite inter ambaŭ.

La 79-a IKU-sesio okazos kadre de la 111-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Graco (Graz), Aŭstrio. UEA invitas proponojn por IKU-prelegoj, kiujn oni sendu al la IKU-sekretario retpoŝte per iku@uea.org, plej laste la 31-an de januaro 2026. Estante jam kvazaŭ tradicio, ankaŭ ĉi-kongrese okazos lige al IKU studsesio de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) kaj Scienca Kafejo (SK). Tiu lasta programero konsistas el mallongaj (ĉ. duonhoraj) prelegoj, eventuale pli konversaciaj ol kutima universitata lekcio. Kandidatoj por IKU-prelego povas samtempe proponi AIS-kurson, kiu konsistos el unu IKU-prelego, kune kun 1-2 kromaj prelegoj kaj eventuale ekzameno. Bonvolu indiki, ĉu via propono estu konsiderata nur por IKU, por IKU kaj eventuale AIS-kurso aŭ nur por SK.

La proponoj estu fakecaj, tamen taŭgaj por pli vasta, klera publiko. Ĉiu propono enhavu mallongan resumon de la prelego kaj koncizan biografieton de la preleganto, sume duonpaĝon.

Aparte estas bonvenaj proponoj de personoj, kiuj ne jam aŭ malofte prelegis en IKU. La proponojn prijuĝos la IKU-komisiono laŭ objektivaj kriterioj. Kvankam la nombro da IKU-prelegoj estas necese limigita, SK estos tute trafa scenejo por prelegoj ekster tiu areo. Ĉiu ĉeesta preleganto devas esti kongresano kaj mem zorgi pri sia aliĝo al la UK ĉe uk.esperanto.net.

Akceptita IKU-prelego, IKU-AIS-kurso kaj SK-prelego estos rekompencita per honorario. Tamen duono el la honorario estos pagata nur se la teksto estos liverata de la preleganto ĝustatempe por kompilado de la IKU-libro. Pliaj detaloj kaj resumo de antaŭaj prelegoj troviĝas en la retejo de IKU:

uea.org/kongresoj/universitato. La IKU-regularo troveblas per la ligilo https://uea.org/teko/regularoj/iku_regularo.

Aĉeteblas [ĉe la Libroservo de UEA](#) la papera IKU-libro 2025 kiel same IKU-libroj de antaŭaj jaroj. Ĉiuj estas bonvenaj akiri tiujn valorajn verkojn kaj aliĝi al la 111-a UK: uk.esperanto.net.



IKU-libro 2025

ARTA PROGRAMO EN PRAGAJ KANALOJ

Meze de novembro praga Muzeo de Literaturo organizis interesan artan programon pri Theodor Adalbert Rosenfeld (T.R.Field), en praga kanalaro, pli precize en Malnova Purigejo de Poluakvo.

Kiu estas T.R.Field? Kial en kanalaro?

T. R. Field, civilnome **Bohdan Šumavanský** (1891-1969), estis praga poeto, verkisto, kreanto de fantaziaj literaturaĵoj, kreinto de figuro LOMIKEL, dio de kanaloj. Krome li elpensis fantazian popolon de KRHÚTOJ, por kiuj li kreis eĉ ilian (sensencan) lingvon.

Por la programo venis sufiĉe multaj homoj. En subtera, vere malvarma laborejo de akvopurigejo, oni legis kelkajn personajn notojn de kalendaroj de T.R.F., prezentiĝis muzikgrupo kantanta liajn tekstojn kaj fine okazis boatflosado sur subtera akvotorento.

Mi estis invitita por la vespero, ĉar mi persone konis T.R.F.-on, kiun mi nomis per familia nomo TEDA. Nia interkonatiĝo komenciĝis jene: La edzino de T.R.F., **Štěpánka Šumavanská**, certe kun aŭreolo koncerne sian edzon, estis **praga esperantistino**, amikino de mia avino Anna Rýznarová. Štěpánka kelkfoje vizitis nin en Svitavy kaj tiam mi estis invitita al Prago. Do mi, ses, sepjara, dum du jaroj vizitis la geedzojn Šumavanský. Kun „onklino“ Štěpánka mi trairadis Pragon, vizitis kelkajn memorindaĵojn, rigardis noktan brilantan Venceslaan placon, vizitis Esperantoklubon. Esperantlingve mi salutis la klubanojn kaj ili estis entuziasmigitaj pri mi.

Teda preferis restadi hejme. Tie li konatigis min kun sia verkaro: kun LOMIKEL, nacio de KRHÚTOJ, kun

liaj pentraĵoj. Pleje plaĉis al mi liaj etaj, spritaj poemoj.

Post miaj du vizitoj ĉe Štěpánka kaj Teda, pli poste, finiĝis niaj kontaktoj. Bedaŭrinde.

Nur antaŭ eble kvar jaroj informis min nia erudicia Mirek, ke T.R.F. estas – de literaturspertuloj – konata persono, verkisto, poeto, fantaziulo. De tiam mi denove ekinteresiĝis pri li kaj ankaŭ pro tio mi ektroviĝis en la programo de la Muzeo de Literaturo. Interesa afero.

Leonarda Chaloupková

Rimarkigoj de M. Malovec:

1. En junulara bulteno Taĝiĝo 1958/40 aperis jena informo (p. 17) de J. Mařík:

Junega esperantistino. Leonka Rýznarová el Čtyřicet Lánů apud Svitavy estas sesjara knabino. Printempe ŝi vizitis kun sia esperantista onklino Šumavanská la Esperantistan klubon en Praha kaj ŝi atente sekvis la esperantlingvan programon. Kora aplaŭdo sekvis ŝian bele diritan esperantlingvan saluton, kiun ŝi alportis de la esperantista junularo en Svitavy al la kluba junularo en Praha.

2. En libro **Vladimír & Ondřej Neff: Večery u krbu** (*Vesperoj ĉe kameno*, Praha 1986) sur p. 36 estas mencio pri T. R. Field, ke dum verkistaj vesperoj li ŝprucigis spritaĵojn kaj aforismojn dum dudek minutoj, poste li silentiĝis, rigardis melankolie el fenestro kaj post duonhoro li revenis al la tablo plena de nova energio kaj spriteco.

3. Antaŭ tridek jaroj mia tiama kunredaktoro Karel Daněk konatigis min kun poemoj de Field kaj eĉ instigis min kelkajn esperantigi.

JUBILEANTOJ DE OKTOBRO, NOVEMBRO KAJ DECEMBRO 2025

Tamara Grusová, Praha
Zdeněk Heiser, Havířov
Kateřina Hosová, Havířov
Mgr. Monika Kimáková, Ostrava
JUDr. Marie Kovářová, Praha
Pavla Linková, Kadaň
Alfred Lotter, Horní Suchá
Jan Martan, Pardubice
Dagmar Potišková, Teplice nad Bečvou
Daniel Pustka, Kozlovice
Miroslav Severa, Česká Lípa
Ludmila Srbová, Pardubice
Karel Strouha, Kamenice
Jaromír Štícha, Chlum
Hana Talášková, Šumperk
Ing. Stanislava Nováková, Pardubice
Ing. Pavel Novák, Prostějov

La redakcio de Starto sincere dankas al sinjorino Ludmila Srbová, jubileantino, kiu sindone longdaŭre kunlaboras kun Mirka Kosnarová ĉe kreado de Informilo (AEH).

Sincerajn gratulojn al jubileantoj, deziron de feliĉo, sano, vivkomforto!

Korektoj

En la lastan Starton 3/2025 enŝteliĝis eraroj: en nekrologo pri Jindřiška Dubinová (p. 93) ni erare skribis, ke ŝi transloĝiĝis al Poděbrady. Fakte ŝi loĝis en Nymburk kaj de tempo al tempo vizitadis la klubon en Poděbrady (inf. de P. Polnický). Sur la lasta paĝo maldekstre malsupre la foto ne estas el ekskurso al Pálava, sed el Arbara Panteono (inf. de M. Kolka).

Esperanto ĉe Masaryk-universitato

En la studprogramo de la filozofia fakultato ĉe Masaryk-universitato en Brno aperis kurso **LgV35 Esperanto I** kun preleganto Mgr. Matyáš Foltýn por aŭtuno 2025 kaj **LgV36 Esperanto II** por printempo 2026. Samtempe Mgr. Jan Havliš, Dr., prelegas interlingvistikon en kurso **LgV30 interlingvistiko**.

Sternenhoch renovigita

Teatro ABC (Vodičkova 28) proksime de Venceslaa placo en Prago renovigis spetaklojn de la esperantlingva opero Sternenhoch de Ivan Acher por la aŭtuna sezono 2025.




Prima senior

Jindřiška Drahotová tradukis en la ĉeĥan libron de **Ed Borsboom** pri **Andreo Cseh**. Ŝi ankaŭ estis honorigita per titolo **Prima Senior** de samnoma organizo.

Ni kondolencas

■ La 18-an de septembro 2025 forpasis en Brno evangelia paroĥestro **Jiří Gruber**, nepo de Stanislav Kamarýt. En la jaro 2022 li transdonis al M. Malovec Esperanto-gazetojn de sia avo kun ties stampaĵo kiel posedanto (nun ili troviĝas en nia muzeo en Svitavy).

Roman Dobrzyński (1937-2025)



La eminenta pola esperantisto, honora membro de Pola E-Asocio kaj de UEA, forpasis la 13-an de novembro 2025 en Varsovio. En la sama urbo li naskiĝis antaŭ 88 jaroj, la 1-an de novembro 1937.

Li iĝis esperantisto 18-jara (1955). Kiel studento li instruis, verkis, redaktis, estante estrarano de Pola Esperanto-Junularo, vicprezidanto de TEJO (1955-1968) kaj redaktoro de *Kontakto* (1968-1970).

Li magistriĝis unue pri juro, poste pri ĵurnalismo per tezo pri la Esperanta gazetaro. De 1973 ĝis 2003 li laboris kiel ĵurnalisto de Pola Televido.

En 1987 li filmis la Varsovian UK (Varsovio cent jarojn poste). Inter 1989-1992 li estis vicprezidanto de UEA kaj kontribuis al establo de **Fondumo Zamenhof**.

En 1995 li esperantigis televidan lingvokurson de BBC **Mazi en Gondolando**, kaj en la jaro 2001 aperis lia libro **La Zamenhof-strato**, en kiu li intervjuis arkitekton Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof, nepon de Majstro. La libro

estis poste tradukita en la litovan, ĉeĥan, japanan, kroatan, slovenan, portugalan, slovakon, francan, hungaran, italan, germanan kaj hispanan. Inter la jaroj 2007 kaj 2008 li kunverkis la libron **Bona Espero**, pri brazila hejmo por orfaj infanoj.

En 2005 li fariĝis Honora Membro de UEA kaj la 10-an de novembro 2022 la ministro pri kulturo kaj nacia heredaĵo de Pollando, Prof. Hab. D-ro Piotr Gliński, decidis aljuĝi al Roman Dobrzyński gravan ministerian distingon: la bronzan medalon Merita por Kulturo “Gloria Artis”.

(Laŭ Vikipedio)

Karl Heinz Schaeffer (1942-2025)

La 20-an de oktobro 2025 forpasis K. H. Schaeffer, germana emerita apotekisto kaj esperantisto, afegvidanto de Germana Esperanto-Biblioteko en Aalen (unu el la plej bonaj kaj gravaj bibliotekoj en Esperantujo).

Alberto Rodríguez Pineda (1953-2025)

La 13-an de junio 2025 mortis kunfondinto de Kuba Esperanto-Asocio, kunorganizanto de du Universalaj Kongresoj (1990 kaj 2010) kaj aliaj aranĝoj en Kubo.

Prof. Wang Ju-kwei (1933-2025)

Elstara tajvana matematikisto, esperantiginto de mil artikoloj el la ĉina, angla, franca kaj germana forpasis la 23-an de majo 2025. Li reprezentis Tajvanon en Azia Kongreso en Mongolio.

Jak platit svazu

Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 36 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**. Do Zprávy pro příjemce uveďte jméno a příjmení a účel platby (např. **Jan Novák, členství ČES**). Pokud platíte za klub nebo sekci, uveďte své jméno a pošlete seznam za koho platíte na emailovou adresu Andrey Švubové a.svubova@email.cz.

Můžete, ale nemusíte, jako variabilní symbol použít čísla níže uvedená, případně své členské číslo:


- 06940** členství ČES
- 06941** členství UEA
- 06942** předplatné Starta bez členství
- 06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
- 06944** poplatek UK
- 06946** konference/sjezd ČES
- 50400** komise pedagogická ILEI
- 50401** písemný kurs začátečníci
- 50402** písemný kurs pokročilí
- 50800** sekce nevidomých LIBE
- Své účty mají KELI a IKUE**
- 51000** sekce křesť. esp. KELI,
č. ú. 123 - 830 734 0217/0100
Komerční banka Poděbrady
- 51100** sekce katol. esp. IKUE
vlastní b. ú. 1647837113/0800

Předplatné časopisů



20 let (od Starta 1/2005) vykonával roli zprostředkovatele **Pavel Polnický**, čestný člen svazu. Děkujeme za jeho práci, nejen ohledně předplatného – rediguje také časopis Dia Regno, uspořádal několik KELI-kongresů i svazové konference v Poděbradech a bude se podílet na další v příštím roce. Nemalou zásluhu měl na úspěchu UK 1996 v Praze, kde zpracovával evidenci téměř 3 tisíc účastníků.

Nyní svou funkci předal **Janě Zigal**, kterou mnozí znají pod jménem Burianová z doby práce v mládežnické sekci před 30 lety. Podílela se na svazovém sjezdu v Brně v roce 2019 a letos při UK v Brně měla na starosti výlety.



Jak objednat

Do emailové objednávky uveďte jméno příjmení poštovní adresu nebo emailovou adresu, objednávaný titul Svou objednávku zašlete na email peranto@esperanto.cz

Pak zaplatíte částku pro daný časopis a typ předplatného na účet svazu **2800186228/2010** a do **Zprávy pro příjemce** uveďte: jméno, příjmení, časopis, rok. Příklad:
Jan Novák, předplatné Monato 2026

Monato: 1456,- Kč (pozemní poštou), 1506,- Kč (letecky), 879,- Kč (elektronicky), 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4

Juna Amiko: 350,- Kč, elektronicky 190 Kč, 4 čísla ročně, 40 stran formátu A5

Literatura Foiro: 1500,- Kč (1000,- Kč pro členy „Esperanta Civito“), 6 čísel ročně, 56 stran formátu A5 (elektronicky nevychází)

La Ondo de Esperanto vychází pouze elektronicky ve třech kategoriích:

- 1. Abonanto – 400 Kč**
- 2. Amiko – 800 Kč**
- 3. Patrono – 2600 Kč**



**Periodikum Českého
esperantského svazu, z.s.
56. ročník**

**Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**starto@esperanto.cz
http://www.esperanto.cz/starto**

**Předplatné v Česku
(bez členství ve svazu): 200 Kč
Členská evidence a změny adres:**

**p/a Mgr. Andrea Švubová, DiS,
svubova@esperanto.cz**

Uzávěrka příštího čísla: 1.2.2026

--

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-
Asocio 56-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj
perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 11 eŭroj, ekster
Eŭropo 13 eŭroj**

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

elektronika versio PDF 6 eŭroj

**Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**Ĉeĥio, starto@esperanto.cz
http://www.esperanto.cz/starto**

Presis: DTP centrum, Svitavy

**Redakto-fermo de la sekva
numero: 1.2.2026**

ISSN 1212-009X

**Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.;
15.11.**

KALENDARO

2025-12-07 Marcipana Kristnasko en
Esperanto-muzeo Svitavy 9-17 h

2026

2026-05-22/24 Ĉeĥa-germana renkonto en
Olomouc

2026-07-20/30 47-a renkontiĝo de Esperanto-
familioj en Kaprálov mlýn kunlabore kun
Verdaj Skoltoj

2026-09-25/28 Konferenco de ĈEA en
Poděbrady

EKSTERLANDE

2026-05-25/02-01 Bibliaj Tagoj en Sankt Goar,
orienta Germanio, Rejnlando-Palatinato

2026-05-23/30 77-a IFEF-kongreso en Serbio
en Mokra Gora

2026-07-19/26 99-a kongreso de SAT en
Leono, norda Hispanio (León)

2026-08-01/08 111-a Universala Kongreso de
Esperanto en Graz, Aŭstrio

Info: <https://uea.org/kongresoj>

2026-08-08/15 Kristana Kongreso 2026 en
Görlitz, orienta Germanio

2026-08-09/16 82-a Internacia Junulara
Kongreso en Tiana, itala Sardinio

ĈEA-prezidanto dankas

La plej signifa aranĝo, kie ĉeĥaj
esperantistoj dum lastaj jaroj kunlaboris, es-
tis sendube la 110-a Universala Kongreso en
Brno. Kelkaj el ni partoprenis organizadon
de UK en Prago en la jaro 1996, sed por
plejparto el ni tio estis la unua (kaj valora)
sperto.

Mi tre ĝojas, ke UK en Brno estas alte
taksata kaj laŭdata de partoprenantoj kaj de
UEA. Tio estas la plej bona konfirmo de
bona laboro de ĉiuj anoj de LKK, helpantoj,
prelegantoj, tradukantoj... simple de ĉiuj,
kiuj kompleze proponis helpon. Mi elkore
dankas al vi.

Mi deziras al ĉiuj legantoj de Starto kaj al
ĉiuj esperantistoj feliĉan Kristnaskon kaj
sukcesan novan jaron 2026!!



E-mental' en Londono



Leonka Chaloupková en pragaj kanaloj dum omaĝo al poeto T. R. Field-Šumavanský, edzo de praga esperantistino Štěpánka Šumavanská, esperantista „onklino“ de Leonka



Saluto el Havířov



En Havířov oni tagmanĝis en la sama salono, kie okazis ankaŭ la programo, prelegoj kaj tombolo kun muziko kaj danco